

La Karavelo

internacia kultura magazino en esperanto



HELPU ESPERANTON EN ANGOLO

DONACU UNU LIBRON

Esperanto em 30 horas

paĝo 5



Unua kovrilkapo de La Karavelo



Preferinde kontaktu La Karavelon per
lakaravelo@gmail.com

Adreso

Dr. João José Santos
Rua Damasceno Monteiro, 21-B, r/c dto.
1170-109 Lisboa – Portugal

Telefono (+351) 218 127 801

Fakso (+351) 218 127 801
(nepre telefonu antaŭe)

PoŝTel. (+351) 960 131 515

www.lakaravelo.com

ISSN (papera): 1647-6980

ISSN (DVD): 1647-6999

ISSN (reta): 1647-3353

Leĝa Depono en
“Biblioteca Nacional de Portugal”
301472/09

La Karavelo aperas

ses-foje jare en PDF - senpage
ses-foje jare en revuoj – ĉiu: 8 €
unu-foje jare en DVD – DVD: 16 €

libera softvaro
© João José M. Q. dos Santos

Konstantaj Kunlaborantoj

Konstantaj verkistoj...

Djalma Pessata (Brazilo)
Eduardo Novembro (Portugalio)
Edward Jaśkiewicz (Pollando)
Geraldo Mattos (Brazilo)
Gerrit Berveling (Nederlando)
João José Santos (Portugalio)
Leo De Cooman (Belgio)
Luiza Carol (Israelo)
Nikolaj Neĉaev (Rusio)
Paulo Sérgio Viana (Brazilo)
Roberto Ribeiro (Brazilo)
Roger Gotardi (Brazilo)
Tibor J. Szabadi (Hungario)
Valentin Melnikov (Rusio)

Revizias

Kurt Fischer (Germanio)
Luiza Carol (Israelo)
Roger Gotardi (Brazilo)
Túlio Flores (Brazilo)
Valentin Melnikov (Rusio)

Direktas, redaktas, kompostas

João José Santos (Portugalio)

Fondita de João José Santos
(Portugalio – okt. 2007)

Enhavtabelo

1	Kovrilo: Kampanjo por la angolaj esperantistoj	Redaktejo
2	Enhavo – Kolofono	Redaktejo
3	Informoj	Redaktejo
4	Ĉefartikolo: Navigo al la eterna lando	Redaktejo
5	Kampanjo: Esperanto em 30 horas al Angolo	Redaktejo
6	Poezio - Fernando Pessoa Mesaĝo (40-a poemo)	João José Santos
7	Poezio: Uzu la langon	João José Santos
8-9	El la latina - Angilbert La batalo ĉe Fontenoy	Gerrit Berveling
10-13	Historio: La evoluo (1-a parto)	Leo De Cooman
14-15	Arkeologio: Aspektoj de la kariria kulturo	Roberto Ribeiro
16-17	Historio: 10-a U.K. de Esperanto – 1914 11-a U.K. de Esperanto – 1915	Djalma Pessata
18-19	Rakonto: La muzo Erato	Luiza Carol
20	Rakonto: La leporo kaj la rano	Roger Gotardi
21-23	Rakonto: Paradizero en infero	Eduardo Novembro
24	Recepto de nekuiristo: Polpo en olivoleo laŭ familio Santos	João José Santos



La Karavelo

esperanto-editejo

Informoj pri La Karavelo

Informiĝu per la LK-Katalogo el www.lakaravelo.com
Se vi plu havas dubojn, skribu al lakaravelo@gmail.com

Subteno de La Karavelo

Jen kiel vi povas subteni La Karavelon:
Abonu ĝin. – Aĉetu ĝiajn librojn. – Diskonigu ĝin.
Donacu varojn el La Karavelo.
Skribu aŭ vizitu niajn anoncantojn gratulante ilin
pri anoncado sur niaj paĝoj.



Ekzemplo de papera versio

Magazino La Karavelo

Lingvo: esperanto

Papera versio:

Ses A4-numeroj ĉiujare, tute koloraj, ĉiu kun 24 paĝoj.

Prezo de ĉiu ekzemplero: 8 € + sendokostoj

Jara abono: 48 €

sendokostoj: LK donacas la sendokostojn

PDF-versio:

Legado per komputilo

post elŝuto el www.lakaravelo.com

Prezo: senpaga



Ekzemplo de DVD-versio

DVD-versio:

Ĉiuj pdf-numeroj plus provversioj de aliaj LK-varoj en unu DVD aŭ KD.

Prezo: 18 € + sendokostoj

sendokostoj: al Portugalio 3€ - al E. U. 4€ - al aliaj landoj: 5€

Malnovaj numeroj:

Volumo 1 – n-ro 1 ĝis 6

Volumo 2 – n-ro 7 ĝis 12

Volumo 3 – n-ro 13 ĝis 19

En formato iom malpli granda ol A4, kun kovriloj koloraj, griza enhavo, tre ilustritaj.

Prezo de ĉiu volumo: 23 € + sendokostoj.

sendokostoj: al Portugalio 3€ - al E. U. 6€ - al aliaj landoj: 8€

Rabatita prezo por la tri volumoj: 59 € + sendokostoj.

sendokostoj: al Portugalio 9€ - al E. U. 18€ - al aliaj landoj: 24€



Malnovaj numeroj en tri volumoj

La Ĝenerala Asembleo

unuakta tragedikomedio pri du kontraŭaj konceptoj
rilate la vivon de la esperanto-asocioj kaj rilate esperanton mem
João José Santos

« **Johano Banano** Mi demisios, ĉar... ĉar... (*Li ne laŭtigas la voĉon, sed paŭtas fiereme. Liaj vangoj ruĝiĝas.*) ĉar... ĉar... mi demisios... Mi estas la prezidanto, kaj mi demisios, kiam tio plaĉos al mi.

Artemo Laboremo Neniu demetas el vi la rajton demisii, ho Johano Banano! Tiu certe estus via plej honora ago de kiam vi estiĝis prezidanto de nia asocio! Kaj mi bone scias, ke neniu restigus nian asocion en tian putran staton kiel vi mem. »

el la teatraĵo *La Ĝenerala Asembleo*


11 € + sendokostoj

sendokostoj

al Portugalio: 3€

al E. U.: 4€

al aliaj landoj: 5€



42-paĝa A5-formata

Kie troveblas la LK-varoj

La Karavelo

lakaravelo@gmail.com

Portugala Esperanto-Asocio


Tel.: (+351) 217 141 359 (sabate posttagmeze)

Universala Esperanto-Asocio

<http://katalogo.uea.org/>

PRENU LA LK-KATALOGON EN

www.lakaravelo.com



João José Santos

joajosesantos@gmail.com

Navigo al la eterna lando

OLGA ALMEIDA

LA PLEJ BONA

PORTUGALA ESPERANTISTINO

FORPASIS ĈIMONATE

Sonis mia poŝtelefono. Tage kaj nokte ĝi estas ŝaltita. Je la 9-a horo matene, ĝenerale mi dormas de antaŭ mallonge, ĉar kutime mi laboras la tutan nokton. Jen la nomo de mia amiko Eduardo sur la telefona montrilo. Certe malbona notico. La kurtaj frazoj kaj la tono informis min, ke iu mortis. Post ne multaj sekundoj konfirmiĝis: Olga Almeida. Ne kredeble!

Mi neniam kredas, ke la homoj mortas, kaj post jaroj mi ankoraŭ demandas pri ili al la familianoj, kvazaŭ ili pluvivus. Ĉu pro miaj certoj pri la plua vivo post la korpa morto? Ĉu mia tuta neakceptemo, ke la homoj povus malaperi? Eble ambaŭ, sed tio ne gravas.

Nur gravis tiam, ke tiu afable ridetantan sinjorinon mi ne plu vidos, kiam mi eniros en la sidejon de Portugala Esperanto-Asocio. En unu sekundo ŝia voĉo venis al mia menso, en esperanto, ĉiam en esperanto. Mi neniam aŭskultis ŝin paroli en la portugala, dum pli ol 20 jaroj. Samtempe, en la sama sekundo, en tiu sekundo kiu ne estas tempo sed maltempo, mi memoris la edzon, mian amikon kaj iaman esperanto-instruiston António da Silva Almeida, la kapitanon, kiel ni ŝatas voki lin. Ankaŭ li ne plu junas, kaj tiam mi ektimis, ke la forpaso de la kara edzino, rapide ruinigu lian sanon.

Eduardo rakontis, kion li sciis pri la trista okazo. La konsterniĝo ne ebligis al mi parkeri la malmultajn informojn, kaj post unu horo mi devis telefoni al li por informiĝi.

Ne eblas, ne eblas, ke mi ne plu povos pridemandi al la kapitano, ĉu Olga fartas bone. Kutime li sendas brakumon al mia filo Joĉjo kaj mi sendas kison al Olga...

Mi mortis iom pli. Mi ĉiam mortas iom pli, kiam miaj amatoj mortas. Ili mortas, kaj iom da mi mortas kun ili. Ne, ne, ne temas pri malapero. Temas pri ekvojaĝo. Ili ekvojaĝas kaj prenas iom da mi kun ili. Iam iros mi. Tiel estas pli facile ekvojaĝi, ĉar la valizoj jam iris. Ili ade iris dum dekoj da jaroj.

Mi estas spiritisto, kaj mia certo, ke neniu el ni mortas, estas enorma. Ĝia grandeco okupas mian tutan animon... tiel ke ne eblas al mi pensi alimaniere. Ja ni ne mortas. Nur la korpo elĉerpiĝinta malaperas por esti saĝe reuzota de la Natura Patrino. Ni navigas al pli bona mondo. Tamen, mi tristas, eĉ scianta, ke ŝi plu vivas, ke ŝi iam ridetos al mi... kiam ankaŭ mi ŝin vizitos. Tamen, mi ne povas ĝoji. Ŝi iris al granda vojaĝo, al lando el kie ne facile la noticoj atingas nin. Kaj ŝia edzo miloble pli sentos ŝian mankon ol ĉiuj ŝiaj amikoj. Nu. La konformiĝo ekaperas. Ĉu mi dezirus, ke ŝi pluvivu en la sama korpo por ĉiame? Tio ne eblus. Ŝi multe suferus pro la elĉerpiĝo de la korpo, de ĉiuj korpoj, ĉar neniu materia konstruo estas eterna.

Kiomaĝa ŝi estis, mi ne scias, nur ke ŝi ne plu estis juna. Mi ne scias aliajn detalojn pri ŝia forpaso. Eble la kapitano iom verkos pri ŝi, aŭ eble li dezirus resti kun siaj rememoroj, sen la zorgo verki ion ajn pri la ĉagreno.

JOSÉ SARAMAGO

LA UNUNURA PORTUGALLINGVANO
PREMIITA PER LA LITERATURA
NOBELPREMIO FORPASIS

Samtage, ankoraŭ penante konsciiĝi pri la forpaso de Olga, la televido anoncis la morton de José Saramago. La Karavelo akceptos artikolojn pri José Saramago. La invito estas farita.



KAMPANJO POR DONACO DE LIBROJ

Esperanto em 30 horas

AL LA ANGOLAJ ESPERANTISTOJ



el la redaktejo

(foto: Luando, ĉefurbo de Angolo – el Vikipedio)

La prezidanto de Angola Esperanto-Asocio (AngEA) Ferdinand Kinkani kaj João Cláudio instruas esperanton en Luando.



Ili kaj iliaj gelernantoj havas grandajn malfacilaĵojn aĉeti lernolibrojn. Fakte, ili instruas esperanton al tuta klaso per ununura ekzemplero de la lernolibro *Esperanto em 30 horas*, donacita de LK al AngEA.

Pro tio, La Karavelo iniciatis kampanjon. En tiu kampanjo oni petas, laŭ eble, ke ĉiu partoprenanto donacu unu libron *Esperanto em 30 horas* por la angolaj esperantistoj. La libro kostas 25,00€. Temas pri

kompleta lernolibro de esperanto, por portugallingvanoj, kun 300 paĝoj. Ĝi enhavas gramatikan gvidilon kaj bazajn vortarojn. Do, ĝi enhavas la tutan necesan materialon por ke portugallingvano lernu esperanton.

Ĉi tiu kampanjo daŭros ĝis la 31-a de julio 2010. Post tiu dato, LK anoncos, en sia diskutgrupo, la rezulton de la kampanjo, kaj ĝia redaktisto trovos manieron alvenigi la librojn al Kinkani Ferdinand, kiu distribuos ilin, laŭ sia justa senco, al siaj esperantogelernantoj.

Ĝis nun ankoraŭ ne multaj homoj partoprenis en ĉi tiu kampanjo. Espereble la nombro plialtiĝu ĝis la fino de julio. Por tio, ĝiru 25,00€ al la UEA-konto **jmqs-l**. Sendu mesaĝon al lakaravelo@gmail.com informante, ke vi jam ĝiris vian donacon al tiu konto, indikante ke via celo estas donaci lernolibron al la angolaj esperantistoj.

www.lakaravelo.com



"La nepoj vin benos."

Zamenhof



Kinkani Ferdinand (maldekstre) kaj João Cláudio (dekstre) kun la esperanto-klaso en Angolo. (foto cedita de Kinkani Ferdinand)



FOTO DIKANDO TEL:923232733

Kinkani Ferdinand (maldekstre) kaj João Cláudio (dekstre) kun la esperanto-klaso en Angolo. (foto cedita de Kinkani Ferdinand)



Mesaĝo

João José Santos

trad. el la portugala,
didaktika noto

de Fernando Pesoo

TRIA PARTO – 3: LA TEMPOJ - 1-A: NOKTO

(portugala originaĵo)

A nau de um deles tinha-se perdido (2-4-6-10)
 No mar indefinido. (2-6)
 O segundo pediu licença ao Rei (3-6-8-10)
 De, na fé e na lei (3-6)
 Da descoberta, ir em procura (4-6-9!)
 Do irmão no mar sem fim e a névoa escura. (2-4-6-8-10)

Tempo foi. Nem primeiro nem segundo (3-4-6-8-10)
 Volveu do fim profundo (2-4-6)
 Do mar ignoto à pátria por quem dera (2-4-6-8-10)
 O enigma que fizera. (2-4-6)
 Então o terceiro a El-Rei rogou (2-4-6-8-10)
 Licença de os ir buscar, e El-Rei negou. (2-4-6-8-10)

Como a um cativo, o ouvem a passar (4-6-8-10)
 Os servos do solar. (2-4-6)
 E, quando o vêem, vêem a figura (2-4-6-8-10)
 Da febre e da amargura, (2-4-6)
 Com fixos olhos rasos de ânsia (2-4-6-8-10)
 Fitando a proibida azul distância. (2-6-8-10)

Senhor, os dois irmãos do nosso Nome (2-4-6-8-10)
 - o Poder e o Renome - (3-6)
 Ambos se foram pelo mar da idade (4-6-8-10)
 À tua eternidade; (2-6)
 E com eles de nós se foi (3-6-8)
 O que faz a alma poder ser de herói. (3-6-10)

Queremos ir buscá-los, desta vil (2-4-6-8-10)
 Nossa prisão servil: (1-4-6)
 É a busca de quem somos, na distância (2-4-6-8-10)
 De nós; e, em febre de ânsia, (2-4-6)
 A Deus as mãos alçamos. (2-4-6)

Mas Deus não dá licença que partamos. (2-4-6-8-10)

(esperanta traduko)

La nav' ¹ de unu el ili perdiĝis (2-4-6-10)
 en la malcerta maro. (2-4-6)
 La dua petis al la Reĝ' permeson, (2-4-6-8-10)
 laŭ la fid' kaj la moro (3-6)
 de la malkovroj, iri al serĉado (2-4-6-8-10)
 de l' frat' en fora mar' vuale nigra. (2-4-6-8-10)

Pasis temp'. Ne l' unua nek la dua (3-4-6-8-10)
 revenis de l' fin' funda (2-4-6)
 de l' malkonata mar' al land' doninta (4-6-8-10)
 l' enigman entreprenon. (2-6)
 La tria tiam al la Reĝ' petegis (2-4-6-8-10)
 permeson ilin serĉi. La Reĝ' negis. (2-4-6-8-10)

Kvazaŭ pri arestit', lin aŭdas paŝi (6-8-10)
 servistoj de l' palaco. (2-4-6)
 Kiam lin vidas ili, jen figuro (4-6-8-10)
 de l' febro kaj ĉagreno. (2-4-6)
 Kun fiksjarmokuloj pro anksio (2-4-6-8-10)
 li serĉis la negatan bluan diston. (2-6-8-10)

Sinjoro! La du fratoj de Nom' nia (2-4-6-8-10)
 - la Povo kaj la Famo - (2-6)
 ambaŭ foriris tra la mar' de l' aĝo (4-6-8-10)
 al via eterneco. (2-6)
 El ni foris kun ili tio, (3-6-8)
 kio al anim' donas heroecon. (3-6-10)

Ni volas preni ilin, el ĉi tiu (2-4-6-8-10)
 nia katen' servista. (1-4-6)
 Ĝi estas la serĉad' de nia esto (2-4-6-8-10)
 for de ni. Anksifebre (3-6)
 al Di' ni levas manojn. (2-4-6)

Plu negas tamen Di' la ekvojaĝon. (2-4-6-8-10)

DIDAKTIKA NOTO

Ĉiĵe oni prezentas la skandon de ĉiuj versoj, en la portugala originaĵo kaj en la esperanta traduko. Kutime oni ne faras tion eĉ en beletraj revuoj. Temas pri teknika laboro de la poezia tradukisto, kiu kutime nur prezentas la rezulton. Tamen, gravas ke talentaj esperantistoj, precipe junuloj, kiuj ne sufiĉe studis teknikon konstrui versojn, iom lernu pri la afero. Tia estis la celo de la tradukinto skribi ĉi tiajn didaktikajn notojn.

La portugalaĵajn versojn oni skandas nur ĝis la lasta akcenta silabo de ĉiu verso. Same oni faras en esperanto por reprodukti la portugalan ritmon.

En ĉi tiu poemo, la ĉefaj silaboj de ĉiu longa verso, estas la 6-a kaj la 10-a; kaj en la kurtaj versoj estas la 6-a. La aliaj akcentaj silaboj konsistigas internajn ritmojn malpli gravajn. En la traduko nepre oni restigu la ĉefajn akcentajn silabojn, sed la internajn ritmojn decidis la propra ritmo de esperanto. Kompreneble, se eble, oni paŭsu ankaŭ la internajn ritmojn de la originaĵo, se tio ne tordas la esperantan frazon.

La skando de ĉi tiuj portugalaĵaj versoj postulas perfektan regon de la portugala lingvo nun uzata en Portugalio. Ĝi estas la sama uzata de Pesoo antaŭ 80 jaroj. Eĉ tiel, la tradukisto devas multfoje legi ĉiujn versojn por ilin senti, kaj semantike kaj ritme, kaj alĝustigi la komprenon de ĉiu verso al la ĝenerala senco prenebla el la poemo. En ĉi tiu poemo, videble regas la ritmo 2-4-6-8-10.

Ja poezio ne estas nur inspiro, sentemo, sentivo kaj artemo. Ĝia teknika parto postulas paciencon por multfoje kalkuli kaj rekalkuli silabojn, relegi la versojn, rekapti la sencon, rekalkuli la silabojn... Ĉu malfacile!? Ne. Nur iom laborige, sed kompensas la laboron la plezuro vidi belan poemon en esperanta kostumo, por regalo de la esperanto-uzantoj.



1 Ĝenerala nomo donita al grandaj velŝipoj el Iberio, precipe por ŝarĝoj, uzataj de la 13-a ĝis la 16-a jarcentoj. (latine *navis* /nauis/ ; portugale *nau* /naŭ/ ; hispane *nao* /nao/ ; katalune *nau*)
 La latina /nauis/ jam estis ŝanĝiĝinta al [navis], de antaŭ longe, en ĉi tiu epoko.

Uzu la langon


João José Santos

Uzu la langon dolĉe kaj kun lerto.
Viajn celaĵojn tuŝu delikate,
kise kaj tikle, milde kaj plensate.
Ĝojos vi frande per buŝa aperto...

Kristalos akvo en varma dezerto,
Sune fandiĝos la glacia mato.
Per tuŝ-retuŝoj suple kaj kun ŝato,
ĝojigos vi pri tia ĉi deserto.

Uzu la langon lakte kaj efike!
Gustumos rave vi en streta trako,
plene plaĉigos vi laŭvole ŝike...

Uzu la langon kun efik' kaj lakto!
Vortojn artisme majstru kaj lingvike,
se poezion verkas vi kun takto.




La lango de Albert Einstein

Teknikaj poeziaj notoj

La ritmo de la poemo estas 4:6:10 (heroa verso), kaj la rimo ABBA/ACCA/DED/FDF. La anaforo "Uzu la langon" centrigas la leganton sur la ĉefan ideon de la soneto, kies ambigua signifo estas facile trovebla de normala leganto de esperanta poezio. La ambigueco disvualiĝas en la lasta strofo, kiu petrarko-stile finas la poemon per ora ŝlosilo. Interesatoj legu pli pri la strukturo interna kaj priforma de soneto ĉe faka literaturo.

Post Scriptum: Iu ajn penso vortludanta, kiel "frandi/frandzi", inter multaj aliaj, kaj enkondukanta onin al humidaj aperturoj, stretaj varmaj kanaloj k.s., eĉ ne unu momenton trapasis la puregan cerbon de la poeto, kiu aludis nur al la majstreco uzi la vortojn, de la komenco ĝis la fino de la poemo.



Zamenhof
Um Cidadão do Mundo
Djalma Pessata

- ★ Língua: **português** do Brasil
- ★ Cerca de 60 minutos

★ DVD com documentário sobre a vida de Zamenhof

18 euros mais portes de envio

Esperanto em 30 horas
João José Santos



- ★ Língua: **português** europeu
- ★ Prefácio de Geraldo Mattos
- ★ A5 – 300 páginas – ilustrado
- ★ Manual com 25 lições
- ★ Guia Gramatical
- ★ Anexos
- ★ Vocabulário Esper.-Português
- ★ Vocabulário Portug.-Esperanto

25 euros mais portes de envio



Gerrit Berveling

trad. el la Latina

versoĵ pri La batalo ĉe Fontenoy¹



Politika mapo de Eŭropo aludita en la 1-a noto.

Angilbert (? - ?)

Enkonduko

La poemo estas akrostiko. La Latina lingvo ne distingas inter I kaj J; krome mi min sentis pravigita uzi Ĉ anstataŭ C, ĉar tiuepoke la C foje estis prononcata Ĉ.

Ĉi-foje mi prezentas poemon kiu min ĉiam tre kortuŝas: post la batalo nur restas veado, ne venkokrioj. Ĉar en ĉiu militado ĉiam ekzistas nur perdintoj.

Karolo la Granda entreprenis kunigi Okcident-Eŭropon. La papo, kiu ne rekonis la imperiestron en la Orienta (Bizanca) Regno kiel leĝan imperiestron ("ino ne povas esti"), sanktoleis Karolon imperiestro. Lia filo Ludoviko la Pia transprenis la potencon; la historio montras kia estro li estis... Post ties morto la Regno disfalis, kaj jam baldaŭ rezultis el tio okcidente la sufiĉe unueca Franca ŝtato kaj oriente la flikaĵa kurteno de la Sankta Germana Regno de Germana Nacieco. Ties imperiestra titolo, malgraŭ politikaj tensioj kaj eĉ malgraŭ religia displitiĝo pro la Reformacio, restis ĝis en la generacio de Napoleono, kiu denove arogis al la Franca flanko la imperiestran titolon – oriente estiĝis la Aŭstra-Hungara imperiestreco. Kaj pli oriente, post falo de Bizanco ekbrilis la Rusa Imperio – same kun imperiestra titolo...

En sekvaj numeroj mi intencas prezenti iom pli da tekstoj el tiu Karolida periodo.

¹ La batalo ĉe Fontenoy (alia formo de la nomo: Fontenay) okazis sabaton la 25-an de junio 841. La ambicioj de Lotario, fariĝi la sola heredanto de imperiestro Ludoviko la Pia, tiubatalo definitive fiaskis. Samepoka Langobarda teksto diras, ke venkis Hlotharo, sed poste ĉiuj lin forlasis. Tio iome montras la situacion: la tri fratoj, kutime konataj kiel Lotario, Ludoviko la Germana kaj Karolo aŭ Karlo la Kalva, dividis inter si la regadon. Lotario ricevis ankaŭ la honoro-titolon *imperiestro*, sed ekster sia propra teritorio, kiu etendiĝis ekde la nuna Nederlando tra Svisujo ĝis en Italujon, li havis neniun ordon-povon. Ludoviko efektive regis la orientan (Germanan) parton, Karolo la okcidentan (Francan). Depost tiam la revo de ilia avo Karolo la Granda pri unusola Kristana Imperio definitive fariĝis nura revo. En Strasburgo Ludoviko kaj Karolo renkontiĝis por fiksi interkonsenton per solena ĵuro. Ambaŭ tie uzis la lingvon de l' armeo de la alia. La teksto de la pra-Franca ĵuro konserviĝis en la *Historioj* de Nithard.

El la ĵuro de Strasburgo en *lingua Romana* jen fragmento:

Pro Deo amur et pro christian poplo et nostro commun salvament, d' ist di in avant, in quant Deus savir et podir me dunat, si salvarai eo cist meon fradre Karlo et in aidha et in cadhuna cosa, si cum om per dreit son fradra salvar dist, in o quid il mi altresi fazet, et ab Ludher nul plaid numquam prindrai, qui meon vol cist meon fradre Karle in damno sit; - t.e. Pro amo je Dio kaj pro la kristana popolo kaj nia ambaŭa saviĝo, ekde la hodiaŭa tago, kiom Dio donacos al mi la scion kaj la povon, mi subtenos mian fraton Karlo per mia helpo kaj en ĉiu afero, kiel laŭ justo oni devas subteni sian fraton, por ke li agu al mi same, kaj kun Lotario mi eniros neniun intertraktadon, per kiu intence mi povus noci al mia frato Karlo.

En 843, en Verdun, la dividiĝo de la Regno fariĝis fakto. (GB)

versoj pri La batalo ĉe Fontenoy

- 1 Akran nigron de la nokto ŝiris Fru-Aŭrora for:
tio ne sabato estis, sed la faŭko de Infer'!
Frata ligo disrompiĝis: ĝojas fie ĝin demon'.
- 2 Bojas la milito ĉie, grava iĝas la batal',
frat' mortigi provas fraton, same onklon jen la nev',
eĉ la fil' al patro faras kion ne meritas li.
- 3 Ĉu sur Roma batalejo buĉis iam oni pli?
Krist-ordonoj dispeciĝis, fluas tie jen inund'
sango-onda, en subtero gajas gorĝo de Tartar' ¹².
- 4 Dekstra man' de l' Ĉiopova estas ŝirmo por Hlothar',
propramane ĉi venkanto luktis kun granda kuraĝ';
se l' aliaj ja batalus same, certe estus venk'!
- 5 En perfido la Savinton foje delasis Judas':
same, reĝo, vin la Estroj elliveris al la glav'.
Vi singardu! Ne kaptiĝu laŭ ŝafido antaŭ lup'!
- 6 *Fontanela* nomas fonton kaj vilaĝon kampular',
kie estis ĉi buĉado, ĉi pere' de Franka sang';
kamp' hororas, marĉ' hororas, eĉ hororas la arbar'.
- 7 Gutoj pluvos plu neniam nek roso sur ĉi herbej',
kie falis la fortikaj, tiom lertaj en batal',
kiujn ploras frat', fratino, patr', amikoj kaj patrin'.
- 8 Hidajn krimojn ĉiuflanke, kiujn notas ĉi poem',
batalante kun l' aliaj, vidis mem mi, Angilbert:
sola vivas nun el multaj, el l' unua batalvic'.
- 9 Infren mi en valon spektis, tute retro ĝis la roj',
kie siajn kontraŭulojn nia forta reĝ' Hlothar'
venkis kaj en fuĝon pelis ĝis la fluo de la roj'.
- 10 Kaj l' armeo de Karolo, kaj l' arme' de Hlodovik'
ambaŭ blanke kovris kampojn per vestaĵoj de la mort',
kiel en aŭtun' kutimas reblankiĝi cikoni'.
- 11 Laŭdo ne al ĉi batalo indas, nek muzika kant'.
Oriento, okcidento, kun la sudo kaj la nord'
ploru tiujn, kiuj mortis tie en tia sufer'!
- 12 Malbenita tiu tago, el la tuta kalendar'
ĝi strekiĝu, forgesiĝu por la plena estontec'.
Nek la Suno nek Aŭrora eĉ krepuske lumu ĝin!
- 13 Nokto posta de ĉi tago, ho terura tiu nokt',
nokto tiu plendoplena, same plena je ĉagren'!
Unu mortas, unu ĝemas, sub terura torturiĝ'.
- 14 Oj ĉi tristo! Oj lamento! Ĉi mortintoj en nudec'
- ties karnon korv', vulturo, ŝate voras lupo ĝin -
ho hororo, ja sentombe ĉi kadavroj vanas jen.
- 15 Plorojn ne, nek ululadojn povas mi priskribi plu.
ĉiu nun laŭ propra povo venku pri la larm-verŝad'.
Por ripozo de l' animoj ni nun preĝu al Sinjor'!



² Tartaro - alia nomo por Infero. (GB)




Leo De Cooman
tradukis el la flandra en esperanto,
el la verko de sia frato Emile De Cooman
laŭ rememoroj pri la familia historio

LA EVOLUO

BILDOJ EL NIA JUNECO

verkita de
Emile De Cooman



Sur la foto el 1935 videblas 7 el la 9 filoj de niaj gepatroj. La tria fileto mortis tre junaĝe. La lasta, la tradukinto de ĉi tiu verko, ankoraŭ ne estis naskita. La azeno kaj la ĉaro apartenas al la melkistino.
(foto de LDC; li sendis ĉiujn fotojn, kiuj ilustras ĉi tiun artikolserion)

Enkonduko

La okazaĵoj kaj kulturaĵoj de ĉi tiu historia rakonto havis kiel scenejon la estintan Flandrujon. Antaŭ kelkaj tagoj, ĉi tie okazis grava elektropaneo, kiu daŭris eternon (23 minutojn!). Valoras la penon iom pripensi, kiel la aferoj evoluis kaj memori la "tiaman tempon".

Naskita en la komenco de la dudekaj jaroj, mi ŝatas iom esplori la pasintecon. Jam nun ni rajtas diri, ke ni travivis la plej grandiozan progreson el ĉiuj epokoj. Kio ekde nun povos ankoraŭ okazi, estas nur alĝustigoj kaj pli bona disvastigo de la trovitaĵoj. Eĉ desegnistoj de bildstrioj kaj aŭtoroj de rakontetoj ne plu sukcesas fantazii ion vere novan.

Por ilustrati mian rakonton, mi komencos mense retravivi tagon el nia juneco ekde la vekiĝo ĝis la enlitiĝo.

Por miaj genepoj kaj pragenepoj tio certe estos malkaŝo, ĉar tiele ili ekkonscios la lukson, en kiu ili nun vivas. Sed ne ekpensu, ke ni havis la senton malhavi ion. Ni disponis ĉion necesan kaj vivis en - laŭ tiu epoko - relativa bonfarto. Se ni vivus nun tiel, kiel ni vivis tiutempe, ni certe estus konsiderataj kiel mizeruloj.

Kie mi parolas pri "la urbo", temas pri la domaro kaj la loĝantaro de *Geraardsbergen*, en Flandrujo.

Ordinara tago en 1925

Imagu, ke vi iru al la stacidomo aŭ lernejo en 1925. Kiel vi vekiĝos? Hodiaŭ simpla natura reago estus tuŝeti la elektran vekilon por silentigi ĝin kaj ektiri la ŝnureton super la lito por ekbaniĝi en lumo.

Noktolampeto

La lampeto konsistis el vitra vazo (kelkfoje el vitro kun lakteca koloro) garnita per prenilo kaj supre kun ŝraŭbrelo. En ĝi estis ŝraŭbita latuna ĉapo, konsistanta el meĉingo kun perbutona regulilo kaj la tenilo por la lampcilindro kun profilitaj risortoj por fiksi la lampcilindron tiamaniere, ke ĝi estis fikse tenata kaj tamen povis dilatiĝi. La lampcilindro (aŭ konuso ĉi-kaze) havis malhelkoloran kaj senkoloran flankon. Plenigita per purigita petrolo, ĉi tiu lampeto povis lumi dum pluraj tagoj. La meĉo konsistis el kotona ŝnuro (plektita, kiel nun ankoraŭ estas iuj laĉoj). La meĉon oni supren aŭ malsupren igis per regulbutono. Por lumigi ĝin, oni devis iom suprenigi la meĉon kaj flamigi ĝin per alumeto. Ĉe grandaj lampoj oni devis unue forigi la cilindron. Por estingi, oni iom malsuprenigis la meĉon kaj poste simple forblovis la flameton. Por ne bruligi al si la vizaĝon oni tenis la manon inter la glaso kaj la vizaĝo kaj rapide forte oni forblovis la flamon. La kutima lokiĝo de dormolampo estis sur la noktotablo, sed foje ĝi troviĝis ĉe muro sur konzoleto.



Noktolampeto



Emile De Cooman

naskiĝis je la 29-a de decembro 1922 en la flandra urbo *Geraardsbergen*, kiel la dua filo en serio de naŭ filoj, kies lasta estas la tradukinto de ĉi tiu verko.

Patro *Jan* estis artpentristo - gravuristo. Emile jam frue interesiĝis pri gravurado kaj poste mem iĝis artpentristo - gravuristo.

De kelka tempo li uzas ne nur penikojn, sed ankaŭ plumon... - fakte komputilon - por priskribi la estintan kaj nunan mondon ĉirkaŭ si. Kiel vi mem povas legi, bildoj estas tre detale fiksiĝintaj en lia menso.

La verko estas skribita en la nederlanda lingvo. Tre ofte la aŭtoro konscie uzas la vortojn, kiujn uzis liaj samtempuloj kaj ofte aldonas la normlingvan tradukon, se ĝi ekzistas, aŭ priskribas la koncepton.

(2002-12-29, okaze de la 80-jariĝo de la aŭtoro Emile De Cooman)



Pezila vekhorloĝo



Risorta vekhorloĝo

La vekhorloĝo

Tiutempe estis speciala murhorloĝo, malnova pendola horloĝo kun tri peziloj: unu por la horindiko, unu por la sonorilo (ĝi sonoris post ĉiu kvaronhoro) kaj unu por la vekilo. Tiun oni haltigis dekroĉante la pezilon... ne forgesante realkroĉi ĝin vespere. Mi supozas, ke ĝi estis faritaĵo de patro Jan.

Post kelkaj jaroj tiu horloĝo estis anstataŭigata per risortpelita vekilo.

Ĉe ni staris petrollampeto sur la noktotableto. Ĝi lumetadis dum la tuta nokto. Mi konis aliajn versiojn el ordinara vitro. Pro tio, ke tra la vitro videblis la rezervo da petrolo, ili estis pli taŭgaj. Nia lampeto staris sur la noktotableto, tiu de niaj gepatroj staris sur konzoleto ĉe la muro. La meĉeto, kiu eĉ ne lumis tiom,

kiom lumas kandelo, donis fantoman prilumadon. Ĝia blua flanko estis zorge orientata al la dormantoj, por ne ĝeni ilin per la lumo. La malforta prilumiĝo de la plafono kaj muroj aperigis antaŭ niaj infanaj okuloj fantomojn, helpe de iu mallonga fabeleto, kiun oni tiam foje rakontis. Fantome. Ni tamen ekdormis kaj pludormis ĝis ni estis vekataj de niaj gepatroj, plejofte de panjo. En la gepatra dormoĉambro estis pendola vekhorloĝo.

Kandeloj

Kvankam kandeloj ekzistas jam de centoj, eĉ de miloj da jaroj, ili ankaŭ nuntempe ne estas malhaveblaj en nia vivo. Nun ili estas helpiloj dum malofte okazantaj mankoj de elektro, aŭ ornamaĵoj, aŭ ankaŭ necesaj atributoj dum religiaj ceremonioj.

Dum nia juneco ili grandparte servis por prilumi nin tie, kie elektro ankoraŭ ne disponeblis.

Vespere ili servis nin en lanterno. Ĉi tiu konsistis el metala framo kun vitraj fenestretoj, el kiuj unu estis malfermebla por eklumigi la kandelon. Ene de la domo kandeloj plejofte estis ne ŝirmitaj, ili staris en kandelingo kun tenilo. Tiu modelo estis pli taŭga sur tablo.

Sed ankaŭ ekzistis modeloj por meti sur konzoleton je muro.

Poste, kiam ni estis pli aĝaj, ni ricevis propran vekilon. Ĝi estis "Jaz"-vekilo, kiu estis iom brua, ne nur por veki nin, sed pro la tutnokta "paĉik-paĉak"-ado.

Oni lumigis kandelon, kiu troviĝis en sekuriga vitra ŝranketo. Tio certe estis bona ideo, ĉar fakte tiuj, kiuj uzis ĝin, estis ankoraŭ infanoj. Ĝi ankaŭ servis ĉe ĉiaj laboroj farendaj en mallumo, kiel: porti nutraĵon al la ŝafoj, aŭ rigli la stalpordegon, aŭ porti mangajaĵon al Blak, la hundo, aŭ havigi freŝan akvon al ĝi.

En la malforta lumo la plej aĝaj filoj vestis sin. Panjo helpis la pli junajn... poste ni rapidis malsupren laŭ la ŝtuparo. Ni fakte devis kontenti pro tio, ke ni loĝis en urbo kaj jam disponis brulgason. En plej multaj lokoj oni devis helpi sin per petrollampoj.



Kandelingo



Ŝirmita kandelo



Konzolkandelo

Gaslampo

Per kaŝitaj kondukiloj la gaso estis kondukata al diversaj lampoj aŭ aliaj gasaparatoj, ekzemple hejtiloj.

Per malfermo de la krano la gaso estis miksata kun aero kaj ekflamis dum eklumigo. La flamo varmegigis ardomufon, la ardilon, kiu disradiis fortan blankan lumon.

La stratlampoj estis eklumataj de urba laboristo, kiu per longa bastono malfermis la kranon kaj ekflamigis la gason.

Poste ekflamigilo kun horloĝa mekanismo anstataŭis la lampiston.



Ĉambra gaslampo



Funkciado



stratlampo Geraardsbergen
Stratlampo



Ardomufo

Alveninte malsupre panjo tiris la ĉeneton de la gaslampo kaj tuj ekestis hela lumo.

Pro la ekflamigilo ne necesis serĉi alumetojn. Per ektiro je la pli mallonga el ambaŭ ĉenetoj la gaso alvenis kaj oni tuj ekhavis plenan lumon. La ardilo (la ardomufo de la gaslampo) estis pritraktenda tre singarde, ĉar post ekuzo ĝi iĝis ege rompiĝema.

La kuirforno

Kvankam ni posedis gasfornon, plejofte tamen estis uzata la hejtilo kiel kuirforno. Ĝi havis pezan supran platon el gisaĵo. Sur ĝi estis tri kovriloj kun ringoj. Tiuj ringoj ebligis rektan hejton de la fundo de pato aŭ marmito per la fajro. Je la antaŭa flanko estis du pordetoj, kiuj estis plej ofte uzataj por malfermite varmigi la spacon de nia malvarmeta kuirejo. Estis tre agrable dumvintre tie varmigi siajn piedojn sensentiĝintajn pro malvarmo. La du malsupraj pordetoj donis aliron al spaco, kie oni sekigis la ekbruligan lignon.

Meze supre estis kradoj por aktivigi la fajron kaj malsupre troviĝis granda cindrujo.

Unue la kuireja hejtilo estis ekbruligata per ligneroj kaj hakaĵoj aŭ rabotaĵoj, kiuj je la antaŭa vespero estis metitaj en la karbujojn. Oni ĵetis pecon de ĵurnalo en la hejtilan fajrujon, kelkajn lignerojn sur ĝin, ekbruligis per alumeto, aldonis pli grandajn lignaĵojn, kaj intertempe plenigis la kaldronon per du kuleregoj da akvo el sitelo sub la lavujo por prepari la kafon.

La kaldrono estis metata senpere sur la fajron.



Kuirplato



Ĝenerala aspekto de la forno

(daŭrigota) ★



Roberto Ribeiro

ASPEKTOJ DE LA Kariria Kulturo

Enkonduko

Hodiaŭ estas ĉirkaŭ ducent indianoj de la etno kariria, kiuj loĝas ĉefe en kelkaj insuloj de rivero São Francisco, inter subŝtatoj Alagoo kaj Serĝipo. Ili vivas tre mizere, forgesis sian lingvon, sian religion kaj aliajn aspektojn de sia kulturo. Antaŭ kvarcent jaroj, tamen, karirioj estis unu el la plej evoluintaj popoloj de Brazilo. Karirioj estis la nura indiĝena nacio agnoskata kiel memstara regno far la Portugala registaro. Portugalio formale deklaris militojn kaj faris traktatojn kun karirioj, kaj Nederlando eĉ havis ambasadoron ĉe ili.

Ĝeneralaj aspektoj

Kaririujo situis en vasta regiono, kiu okupis grandan areon de la nuna Brazilo Nordoriento, escepte de la nuna subŝtato Maranhão. Oni ne scias ekzakte la limojn de ilia teritorio, sed la areo estas maksimume tiel granda kiel Hispanio kaj minimume tiel granda kiel Portugalio.

Karirioj estis agrikulturistoj kaj fiŝkaptistoj. Ili havis "veran" agrikulturon, bazitan sur maizo, batato kaj manioko. Ili plantis ankaŭ guandon ("cajanus caja", speco de fabo), tabakon kaj kotonon.

Karirioj trinkis maizbieron kaj vinon el sovaĝaj fruktoj.

Ili vivis en malgrandaj vilaĝoj, kiuj, malgraŭ tio, daŭris eĉ centjarojn. Ili mumiigis siajn mortintojn kaj metis ilin en kavojn, ofte adaptitajn kaj foje artefaritajn.

Karirioj uzis simplajn vestojn, similajn al longaj tunikoj, kaj ilojn el tajlitaj ŝtonoj, ostoj aŭ ligno. Tre eble ili konis kupron kaj radon, sed uzis ilin tre malvaste.

Historio

Karirioj alvenis la Brazilan Nordorionton, tre eble el Amazonio, ĉirkaŭ 1500 a.K. Tiel ili trovis malpli evoluintajn popolojn, kiujn ili forpelis el la agrikultureblaj regionoj, sed



Nederlanda mapo de Johann Blaeu (1680). Ĝi montras la vilaĝon Janduí (indikata kiel Iandovij). En ĝi, karirioj estas nomataj Tapuyas kaj Tapoyes.

(Fonto: Monda Cifereca Biblioteko de Unesko)

ŝajne toleris ilin en ĉirkaŭaj arbaroj kaj montoj. Ĉirkaŭ 300 p.K. la tupioj invadis la regionon kaj okupis la marbordon. Rilatoj inter tupioj kaj karirioj ĉiam estis malpacaj.

En la mezo de 16-a jarcento, karirioj atakis la tupiojn ĉe la nuna urbo Goiana, en Pernambuko, proksime de la unuaj portugaliaj koloniaj vilaĝoj.

La karirioj nomis sin "nihó" /nji'ho/ en sia lingvo. La tupioj nomis ilin "woiana" /ŭo'jana/ (fremduloj) ¹, "tapuia" /ta'puja/ (fremdlingvanoj) aŭ "kiriri" /kiri'ri/ (mutuloj). El la lasta vorto, portugaloj nomis ilin "cariris" /kari'ris/.



Tipa artefarita kavo de karirioj.

Tuj poste, Nederlando invadis la Brazilan Nordorionton kaj sendis ambasadorojn al la karirioj, ĉefe por aĉetado de lumigila oleo.

Post kiam Portugalio venkis Nederlandon, la reganta patrinreĝino Don Luisa ordonis ataki la kaririojn, ĉar ili estis aliancanoj de Nederlando. Portugalaj trupoj estis venkitaj ĉe la nuna urbo Crato, en Cearao, kaj la regantino devis agnoski la karirian ŝtaton sub la "reĝo" Janduí.

¹ El la kariria vorto "woiana" venis la nomo de la nuna urbo "Goiana". (RR)



Monumento al Teodósio de Oliveira Ledo, en Campina Grande, Paraíba.

Kaririujo evidente ne estis vera regno, kaj Janduí estis nur la triba ĉefo, do li ne sukcesis unuigi kaririojn por rezisti eĉ al malgranda portugala kolonia armeo. Militoj daŭris sesdek jarojn, ĝis la fina venko de portugala kolonianoj sub la komando de Teodósio de Oliveira Ledo.

Karirioj, kiel venkitoj, estis sklavigitaj kaj miksitaj kun afrikaj nigruloj precipe en salaj minejoj, kaj ili havis komunan destinton de afrikanidoj ĝis la fino de 19-a jarcento.

Lingvo

La kariria lingvo apartenas al la lingvotrunko "Makro-Je" (Granda-Jeo), sed en izolita lingvofamilio. Hodiaŭ ĉirkaŭ dek homoj, ĉiuj filologoj, konas ĝin pasive, kaj neniu aktive. Pastroj Bernardo de Nantes kaj Luiz Vicencio Mamiani verkis tri librojn en tiu lingvo: du katekismojn kaj unu gramatikon. Tiuj libroj kaj loknomoj el la kaririaj lingvoj estas la precipaj fontoj por la konado de la lingvo.

Oni pensas, ke la kariria lingvo havis du ĉefajn branĉojn: la nordan, kiu enhavas fonemon /o/ kiel teman vokalon en la plejmulto da vortoj; kaj la sudan, kun tema vokalo /e/. Ekzemple, en norda branĉo oni diris "bodó congó" (la bona akvujo), kaj en la suda "bodó conghé". Bedaŭrinde, oni ne konas detale la nordan branĉon, ĉar la postrestantaj tekstoj apartenas al du dialektoj de la suda branĉo, kaj oni povas rekonstrui nur kelkajn trajtojn per lingva komparado de loknomoj.

La du sufiĉe bone konataj dialektoj, ĉiuj el la suda branĉo, estas la Dzubukuá, danke al Pastro de Nantes, kaj la Kippéa, danke al pastro Mamiani. Krom tiuj, oni konas nur la nomon kaj malgrandan liston de vortoj de du aliaj dialektoj: la Kamuru kaj la Sabujá.

La kariria lingvo, kiel plejparto de la indianaj lingvoj, ne havas numerojn post la numero tri por indiki nombrojn. Vere, ili havas nur vorton por "unu" (*bihê*), "du" (*wachani*) kaj "tiu kiu ne estas du" (*wachanidikié*), pli ol tri, oni diris "proh" (tro)

kaj "crubÿ" (multo).

Tiel kiel ankaŭ aliaj brazilaj indiĝenaj lingvoj, en la kariria, verbo tute ne varias, eĉ ne laŭ tempo. Por indiki tempon, oni uzu adverbos aŭ sufiksojn kiuj signifas "eks-", "-int" aŭ "ont-" post la substantivo, ekzemple: "dicotori" signifas "rabisto", "dicotocri" estas "eks-rabisto" aŭ "rabinto" kaj "dicotoridí", kiu signifas "rabonto".

La kariria lingvo ne havas genron kaj eĉ ne nombron. La pluralon oni indikas per la sufikso "-a", kiu formas la kolektivon: "nhihó" (karirio), "nhihoá" (la aro de la karirioj). Vidu kelkajn ekzemplojn:

a) *Bodó mo era*

= la akvujo estas en la domo;

b) *Bodó conghé mo era*

= la bona akvujo estas en la domo;

c) *Bodoá mo era*

= la akvujo estas en la domo;

ĉ) *Bodoá conghé mo era*

= la bona akvujo estas en la domo.

d) *Wachani bodó mo era*

= du akvujoj estas en la domo.

e) *Bodócri mo era*

= la eks-akvujo (rompita akvujo) estas en la domo;

f) *Bodoridí mo era*

= la estonta akvujo estas en la domo.

Religio

Oni tre malmulte scias pri la kariria religio. Oni scias nur pri ĝiaj aspektoj komdamnitaj de la du pastroj.

Oni scias, ekzemple, ke ili havis ritojn por prezentado de bebo, en kiu ili oleis la infanetojn per porka lardo, kaj ili banis ilin per maiza biero. Tio skandaligis la pastron Mamiani, kiu rigardis tiun riton tre simila al la kristana bapto. Ili ankaŭ oleis la mortintojn, kaj ili havis pekconfeson. Tio skandaligis la pastron de Nantes. Ŝajne ili ne havis ritojn por geedziĝo.

Oni konas la nomon de tri "dioj": Badze, Wanaguidze kaj Politan, cititaj de pastro de Nantes, kaj la nomon de la "demono" Nhiwó. Kredeble, la "dioj" cititaj de la pastro estis homaj herooj, kaj la "demono" estis la personigado de la malsano.

★



Djalma Pessata

UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1914

10-a Universala Kongreso de Esperanto

ĈI TIU KONGRESO NE OKAZIS PRO LA KOMENCO DE LA UNUA MONDMILITO



Ĝi estus...

Loko: Parizo, Francio

Dato: de la 2-a ĝis la 9-a de aŭgusto 1914

Aliĝintoj: 3739

Teatraĵoj planitaj


- ▶ **Georges Dandin**, de Molière;
- ▶ **Pro Malsato**, de Tristan Bernard;
- ▶ **Sokrates**, de B. Richet.

“La 1-an de aŭgusto oni (...) malfermis la akceptejon en *Gaumont Palace*; kaj vidante, ke oni ornamis la tribunon per kreskantaj floroj, miaj dubemaj antaŭpensoj kvietiĝis, kaj mi ĝojiĝis je la certiĝo, ke nia kongreso do malfermiĝos la proksiman tagon.”

(...) “Certe neniu alia kongreso kapablus prezenti al siaj anoj tiel elegantan, grandiozan kaj tamen komfortan kunvenejon.”

(...) “Sed tute alie ĉio okazis! La laboro de la komitatanoj, tage kaj nokte jarlonge, nun, kiam oni staris antaŭ la celo, kiam ĉio estis preta, kaj preta je la ĝusta horo – tiu laboro nun estis brute renversita.”

Astrid Rybo



Bibliografio: Esperanto-raporto de Dana Esperantista Ligo, 1-a jarkolekto, aŭgusto-septembro 1914. N-ro 9-10.

UNIVERSALAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO

1915

11-a Universala Kongreso de Esperanto



Loko: San-Francisko, Usono

Dato: de la 22-a ĝis la 29-a
de aŭgusto 1915

Aliĝintoj: 163

Pro la unua mondmilito nur tre malmultaj eŭropanoj povas veni al tiu kongreso, kompreneble pli amerika ol universala. El Eŭropo partoprenis neniu delegito krom rusa vojaĝanto, sed kelkcentoj da Esperantistoj el Kanado kaj Usono tie kunvenis dum la Monda Ekspozicio, kiu samjare okazis tie.

La 11-a UK ĉefe temis pri:

Kiel organizi la fortojn de la esperantistaro post la fino de la eŭropa milito?

La kongreso voĉdonis deziresprimon, ke UEA tion entreprenu sin turnante al ĉiuj naciaj societoj el sia sidejo en la ekstermilita Svislando.

Teatraĵo Prezentita

► **Perfekta Kuiristino** (Le gourmand ou La parfaite cuisinière.), unuakta komedio de Blanche Hentsch, tradukita el la franca lingvo de Maria Milsom.



Fjodor Postnikov

Fjodor Postnikov (1872-1952), ruso, poste usonano, estis frato de la fama rusa esperantisto Aleksandr Postnikov. Li estis prezidanto de la unua oficiala Esperanto-Asocio Espero (1897-1899), en Petrograd (Rusio).

En la jaro 1906 li publikigis la unuan lernolibron por japanoj. Tie sur unu el la paĝoj estas presita portreto de Postnikov kun la subskribo: "Patro de Esperanto-movado de Japanio."

En la jaro 1915 li organizis la 11-an internacian Esperanto-kongreson en San-Francisko kaj publikigis esperantajn ĉiutagajn ĵurnalojn –"Ekspozicio en Panamo" kaj la fama "Pacifika Espero".



www.lakaravelo.com



Luiza Carol

La muzo Erato

Iufoje, la muzo Erato tediĝis pri poemoj. Jes, tediĝo povas okazi ankaŭ al dioj. Fakte, Erato estis unu el la tri ĝemelaj fratinoj-muzoj, kiuj okupiĝis pri poezio. Kaj kvankam poezio estas la plej grava el ĉiuj artoj, tamen tri feinoj-diinoj, kiuj laboras pri la sama fako, ŝajnas kelkfoje troigo; ĉu ne? Kaj kvankam la tri ĝemeloj amegas unu la alian... tamen kelkfoje ja estas embarase, kiam ili akre malkonsentas pri la konsiloj, kiujn ili donas al homoj! Zeŭso, la patro de la muzoj kaj ankaŭ la reĝo de ĉiuj dioj, volis solvi la problemon kaj tial estis antaŭlonge decidinta, ke la tri ĝemelaj fratinoj dividu sian laboron tiel: unu okupiĝu nur pri ampoemoj, unu nur pri rakontpoemoj kaj unu nur pri koruspoemoj. Kiel li diris, tiel la fratinoj faris. Sed... juĝu vi mem: ĉu eblas verki poemon, en kiu temas NUR pri amo, evitante iun ajn aludon pri la eventoj, kiuj influis tiun amon? Ĉu oni povas imagi poemon, kiu taŭgus NUR por korusa deklamo kaj neniel taŭgus por silenta legado aŭ por la deklamo de unu sola aktoro? Kaj pensu, kiom stulta estus rakontpoemo, se oni klopodus enigi en ĝin neniun vorton pri amo... Ne, la granda Zeŭso ne solvis la problemon, ĉar fakte la tri muzoj de poezio daŭre laboris kune, ofte malhelpante unu la alian.

Ne mirige do ke Erato, la muzo kiu kutimis inspiri la homojn pri ampoemoj, tediĝis kelkfoje. Ŝi opiniis (kaj tute prave!), ke ampoemoj ne malaperos el la mondo ĝis ŝiaj du ĝemel-fratinoj daŭrigos sian diligentan laboron. Ŝi iris al Zeŭso kaj petis por si alian laboron.

— Kion vi ŝatus fari? — demandis Zeŭso, kiu amis siajn filinojn kaj ĉiam klopodis kontentigi ilin.

Erato jam preparis sin por tia demando kaj tuj donis la antaŭpensitan respondon:

— Kara patro kaj mastro, mi delonge opinias, ke la mondo de homoj estas tro griza kaj enuiga. Mi ŝatus aldoni kolorojn kaj belajn artecajn formojn al la mondo. Mi ŝatus instrui la homojn pri desegnado, skulptado, mozaikado... t.e. pri ĉiuj vidartoj.

Sulkigis sian frunton Zeŭso kaj suspiris. "Uf, tiuj tro dorlotitaj filinoj ne konas limojn



Erato – muzo de la poezio.

pri siaj pretendegoj..." — li pensis. Sed li tuj devis konfesi al si mem, ke distribui la saman faklaboron al tri junaj kaj plenenergiaj feinoj-diinoj ne estis tro saĝe de sia parto. Kaj fakte, pli belaspekta mondo de homoj povus esti agrabla ankaŭ por liaj okuloj... Fin-fine Zeŭso konsentis.

Erato revenis hejmen sur la monton de muzoj kaj fariĝis la muzo de vidartoj.

Ho, kiom bela ekaspektis la tuta Tero, post tiu ĉi evento! Iom post iom, la homoj komencis pentri siajn domojn, vestaĵojn, potojn, ĉaretojn... Belaj brilkoloraj statuoj ekornamis la urbojn kaj vilaĝojn kaj la infanoj ekludis per ĉarmaj pupoj kaj aliaj ludiloj... La homoj ĝojis, la dioj ĝojis spektante la homaron vivantan... kaj inter la dioj, la plej kontentaj iĝis la muzoj. Ĉar nun, en la freŝpentritaj domoj kaj freŝornamitaj parkoj, oni pli ofte kaj pli bele muzikis, dancis, poemis, aktoris... Eĉ Zeŭso ridetis fojfoje, kvankam ombro de maltrankvilo videblis en liaj okuloj, kiam li rigardis la novaspektan Teron.

Kaj jen unu tagon okazis, ke iu bona seninfana virino, kiun Erato aparte amis kaj helpis, muldis kaj pentris belegan argilan pupon, kvazaŭ veran bebon. Multajn jarojn la virino estis petinta al la dioj, ke ili donu al ŝi infanon, sed la dioj rifuzis ŝian peton, pro kialoj, kiujn ni, homoj, ne komprenas. Kaj nun, la virino tiom ekamis la argilan bebon,

ke ŝi freneze kisadis ĝin, karesadis kaj alparoladis ĝin, kvazaŭ ĝi estus vivanta bebo... Erato mem, por plezurigi sin, estis influinta tiun frenezan amon al la virino. Nun, kiam ŝi plenumis sian kapricon, la muzo povus ĉesi la ludon. Sed Erato estis stranga muzo, kiun eĉ Zeŭso ne kapablis tute kontroli... Ŝi estis jen kruela, jen kompatema, jen kruela kaj kompatema samtempe... Evidente, Erato estis kortuŝata de la granda amo de tiu virino al la pupo. Erato do decidis plenumi ŝian frenezan peton: ŝi permesis al la virino enigi vivon en la pupon, per kiso.

Kiam ordinara mortebla virino enigis vivon en pecon de argilo, la tempo haltis kaj la ĉielo ekstremitis.

— Fulmotondrojn!! — ekkriegis Zeŭso. — Mil fulmotondrojn!!

Ekbrulis la ĉielo kun bruego, vulkanoj ekelsputis lafon, kaj griza cindro kovris la Teron makulante la ĵus plibeliĝintajn urbojn kaj vilaĝojn. Dume, ĉiuj dioj tremis petante la grandan Zeŭson trankviliĝi. Surgenuiĝinte, plorante, Erato pardonpetis ĉe la piedoj de sia patro. Per subita movo, Zeŭso prenis la orajn buklojn de sia plej amata filino por deŝiri ilin... Ho ne, ne! Li ne kapablis vidi larmojn en tiel belaj okuloj... La fascino, kiun Erato inspiris al sia patro, estis mistera eĉ por ŝi mem... Pli forta ol la forto de la plej potenca dio estis tiu fascino. Zeŭso demetis la manon. Li mildiĝis.

— Sufiĉas. — li diris — Mi pardonas ĉion. Sed mi volas, ke neniam plu okazu, ke simpla homo ricevu dian potencon sen mia konsento. Ĵuru! Ĉiuj ĵuru!

Kaj ĉiuj dioj ĵuris, ke neniam simila afero okazu plu.

Zeŭso decidis tiutage, ke Erato refariĝu muzo de ampozio kiel antaŭe. Neniu aŭdacis kontraŭdiri lin.

Zeŭso ordonis al la Patrino de la Muzoj, igi ĉiujn homojn kaj diojn forgesi pri tiu okazaĵo. La Patrino de la Muzoj, la maljuna feino de la memoro kaj forgeso, forviŝis tiun historion el la mensoj de ĉiuj. Ŝi petis al la Muzo de la Historio deŝiri el sia kajero la folion, sur kiu ŝi estis skribinta pri ĉi tio. Kaj la Muzo de la Historio obeeme faris tion, ĉifonis la paperon kaj forĵetis ĝin en krateron de vulkano.

Tiu papero fariĝis cindro, la cindro parolis al vento, la vento parolis al kolombo kaj la kolombo estas ĝuste mia fidela kolombo, kiu alportas al mi ĉiujn rakontojn.

Mi suspektas, ke la vento neniam forgesis tiun rakonton kaj ĝi neniam tute prisilentis ĝin. Ĉar ankaŭ niatempe estas homoj kiuj pentras kaj skulptas... kvazaŭ ili volus enŝovi

vivon en nevivantajn aĵojn... kvazaŭ neobeema kaprica feino kaŝe inspirus ilin... kvazaŭ tre tolerema dio ŝajnus ne rimarki la malobeemon de sia amata filino...

Sed tiuj estas nur miaj personaj konjektoj, kompreneble...

★



Rakontoj por ĉiuj aĝoj

Luiza Carol

- ★ A5 – 166 paĝoj
- ★ 26 bildoj de Luch Ofer
- ★ Belaj rakontoj por ĉiuj aĝoj

16 eŭroj plus sendokostoj



Zamenhof Um Cidadão do Mundo

Djalma Pessata

- ★ Língua: **português** do Brasil
- ★ Cerca de 60 minutos
- ★ DVD com documentário sobre a vida de Zamenhof

18 euros mais portes de envio



Roger Gotardi

La leporo kaj la rano ¹

*Omaĝe al mia forpasinta
avo Antonio Gotardi*

Iam, antaŭ multaj kaj multaj jarmiloj, la bestoj scipovis paroli.

En tiu praa tempo, vivis en praarbaro nekalkulebla nombro da bestoj, el ĉiaj specioj. Ĉiuj ili vivis amike kaj harmonie, krom la individuista kaj sinflata leporo, kiu vantadis, ke ĝi estas la plej rapida kaj kurlerta el ĉiuj bestoj de la praarbaro.

Se iu kritikis ĝin pro ĝia fikonduto, la leporo kutime defiis la kritikanton vetkuri, por pruvi sian tiel priferatan superecon; la malvenkinto kaj ties tuta specio devus kapklini kaj submeti sin al la jugo de la venkinto. Tiel, timdube pri sia sukceso, ankoraŭ neniu besto iam akceptis la defion, nek trovis rimedon lecioni al la fanfara leporo.

Sed venis tago, kiam malgranda rano, tute laca pri la fileporo, aŭdacis defii ĝin je ekzakte samaj kondiĉoj.

— Akceptite! — tuj jesis la mireganta leporo, kiu pludire elarogantis — Mi povus atendi ĉian ajn beston por kurdefio, krom iu naŭze humidhaŭta rano, kia vi!

Preferinte ne rebati, la humila rano ekparolis pri la defi-detaloj kaj post nelonge saltetis for, jam mense ŝpinante sian mirindan planon.

En la difinitaj tago kaj horo, la rano kaj la leporo staris unu kontraŭ la alia en la antaŭe akordita loko, kiu jam disbleke tumultis: aŭdiĝis muĝoj, henoj, bojoj, mekoj, kveroj kaj iaoj; gruntoj, hurloj, beoj, kriĉoj, kokerikoj kaj miaŭoj; zumoj, pepoj, klukoj, ululoj kaj rukuloj; kaj aŭdiĝis pluraj kaj pluraj aliaj blekoj; nur kvakoj ne aŭdiĝis...

Kaj jen la best-amaso silentiĝis, por aŭskulti la interparolantojn:

— Mi cedas, ke vi konkursu tra la kurvojo ne kovrita de vegetaĵoj. Mi, male, trakuros la densan veprejon apud la riverbordoj — firme diris la rano kun disbrilo en la okuloj.

¹ Adapto de rakonto parole rakontita de mia avo al siaj gefiloj. (RG)

— Haha! Vere ridige! Ti okazas mi atendados vin flosante mansubkape kaj ventr-al-ĉiele sur la river-golfeto! — impertinentis la leporo ankoraŭfoje — Sed kiel mi scios, ke vi estas ja kuranta? Min ĉiuj vidos, sed vin... — demandis la leporo.

— Nu, vi rajtas kiam ajn voki min, kaj tiam mi respondos. Laŭ mia kvako vi povos mezuri la distancon, kiu apartigas min de vi.

— Certe! — konsentis la leporo.

Interkompreninte sin reciproke, la leporo kaj la rano estis pretaj por la defio.

Je la akra ĉirpo de cikado, la leporo sin pafis for tra la senobstakla kurkampo, dum la rano zigzage pelis sin eksalte en la unuan arbetaĵon, antaŭsignante venkotecon.



La spektanta bestaro jam malesperis kaj vekriis.

Sed jen la superruzo rano ekrealigis sian mir-ideon: tra la tuta apudrivera vojeto, post ĉiu arbetaĵo, vice kolektiĝis po unu rano, kiu, je la kvako de la ĝisatingonta, forsaltadis al la sekva, kaj tiel plu... ĝis la alvenpunkto.

— Rano? — kontrole demandis la leporo.

— Kvak! — de antaŭe responde blekis la rano.

La leporo streĉis ĉiujn siajn muskolojn kaj redemandis:

— Rano?

— Kvak! — refoje respondis la rano.

— Ĉu?? — malkredis la malvenkanta leporo.

— Kvak! Kvak! — reblekis la rano, pli distanciĝinta.

La leporo klopodegis alsprinti, sed ŝajnis al ĝi, ke ju pli ĝi urĝigas sin, des pli antaŭe kaj venkanonce sonis la intermitaj kvakoj de la rano.

Fine, spirhalte alvenis, kiel dua, la hontoverŝa leporo, kiu falis elĉerpita, ne antaŭ ol ekvidi ranon brustoŝvele sidantan surborde de la rivero.

Ekde tiam, ĉiuj bestoj de la praarbaro povis vivi tute en paco, inkluzive de la leporo, ĉar la venkinto ne postulis sian vetgajnaĵon.



Paradizero en infero

Eduardo Novembro

— Surprize!!!...

Per ĉi-ekkrio, la salono tuj heliĝas tutplene pro eniro de la ĵusalveninto, restigante lin vidalvide antaŭ aro da ridetantaj vizaĝoj, kiujn li plezure ekrekonas unuope. Vera surprizo ja estas trovi sin ĉirkaŭita de tiom da amikoj interdisputantaj brakumojn al li.

— Bonvenon, bonvenon, Pako!!!... Estu bonvena, plej karega!!!...

— Via reveno sincere feliĉigas nin ĉiujn tre multe!!!...

Konfuzo estiĝas ene de li mem pro tia neatendita akceptado post pli-malpli kvinjara foresto.

— Rakontu!... Kiom da malamikoj vi mortigis en tiu damninda milito!... Rakontu!!!...

Scivolemo speguliĝas sur ĉiuj viraj kaj virinaj vizaĝoj. Li rigardas longe unu post alia por certiĝi, ĉu maljuniĝintaj trajtoj intertempe faltskulptis iun facion.

— Ni avidas la historion pri via partopreno en la granda milito, kiun Libermondo finfine venkis kontraŭ Despotlando.

— Ĉu vi vundiĝis, aŭ multe suferis kiel militkaptito? Ĉi tie oni oficiale sciigis, ke vi estis enkarcerigita en unu el tiuj ja mondvaste fifamaj koncentrejoj. Ni estas volemaj aŭdi pri via tiea travivado, kiaj estis viaj malpacaj elprovoj... Kiom vi eltenis...!

Pako rigardas ilin, denove kun miro, kaj tiam estiĝas lia vico surprizi la amikojn:

— Kiel vi jam scias, mi estis arestata tuj post la unuaj operacoj, sed mi suferis preskaŭ nenion! Mi fartis eble pli bone ol ĉiuj vi tie ĉi. Mi eĉ riskas aserti, ke mi feris en Edeno... Jes, vera paradizero, tiu loko perdita meze de Arjanujo... aŭ pli bone, Despotlando!...

— Neeeeee!!!!..... Ne ŝercu, amiko!!!... Temas pri serioza afero!!!!...

— Jes ja, vere!... Mi spertis vere idilian aventuron!

— Ne eblas!... Rakontu la veron!

Tiuj starintaj eksidas laŭeble, mutsilentaj — ĉemane la pokaloj de la celebranta ĉampano — gape atentemaj al liaj paroloj.

— Ĉu vi ne kredas? Vi volas la veron, ĉu ne? Do aŭdu bone... jen la vera vero!

* * *

Tra vastega kazerno la odoro de nelavitaj korpaj estas naŭza, preskaŭ neeltenebla. Tien apenaŭ enpenetreblas la rasla spirado kaj la flustrado. Centojn da militkaptitoj atenteme

kontrolas — per aŭtoritatumaj rigardoj — soldatoj kun surŝultre portata fusilo, marŝantaj tien kaj reen, inter la vicamasoj da pajlaj tabulitaĉoj. Iu gardisto alproksimiĝas al unu el la tie sterniĝantaj tiuloj, kaj lin ordonas:

— Leviĝu kaj akompanu min!

Pako dubmiene rigardas la alian antaŭ ol moviĝi.

— Hastu!... Hastu!!!

Jam nesufiĉe spiranta pro malbona kaj malabunda nutraĵo de post du jaroj en tiu abomeninda koncentrejo, leviĝado ne estas por li facila movo. Pro tia lanteco la soldato plilaŭtigas sian ordonon:

— Hastu!!!!... Hastu!!! La superulo ne povas atendi pigrulojn!

La kaptito, iom lame, sekvas malantaŭe, renkonte al suboficiro sidanta ĉe skribotablo. Ĉi tiu malestime lin rigardas kaj informas:

— Ekstere vin atendas du el niaj soldatoj, por eskorti vin ĝis ia laborloko... — kaj kun sarkasma ridaĉo — La laboro liberigas!!!!... Iru! Tuj!!

Nefideme, timeme, kurbigita, li akompanas la gardistojn ĝis ne fora kampara vilaĝo, kaj plu tra ĝiaj stratetoj. Unu el la soldatoj premas sonorilbutonon ĉe doma pordo, kiu baldaŭ malfermiĝas, aperigante pezaspaktan mezaĝulon.

— Dankon, soldatoj. Mi atendas vin denove je la difinita horo. — kaj preskaŭ senpaŭze, al la arestito — Post via laboro ĉi tie, vi reiros koncentrejen por tie dormi. — kaj per mana gesto lin kondukas — Envenu! Ĉi-tien, bonvolu!

Ili iras al budo starigita meze de ĝardeneto malantaŭ la loĝejo. Tie, pelmele sur bretoj, ŝrankoj kaj eĉ surplanke dismetiĝas pluraj centoj da ĉiuspecaj radiaparatoj.

— Plejparto el niaj teknikistoj heroece batalas en tiom da frontoj kontraŭ la malamikoj de nia patrio, ke ili mankas ĉi tie. Inter pluraj metioj, ankaŭ por ripari multajn difektitajn ekipaĵarojn, jam superstokantaj ĉi-tiun deponejton. Aliflanke, ĉar nia popolo volas aŭskulti raportojn pri niaj venkoj, mi komisiis al vi, ĉar vi estas fakulo — laŭ tio kion oni informis al mi — la riparadon de ĉiuj ĉi radiaparatoj. Ĉu vi jam sufiĉe bone scipovas nian lingvon por kompreni, kion mi ĵus diris?

Pako kapjesas. Malgraŭ ordonemaj, la alies paroloj estas kvietaj, pri kio li jam de longe estis dekutimiĝinta.

— Atentu, ke la milita situacio ne ebligas ian ajn pagon, sed vi estos pli bone nutrata ĉe ni ol en la koncentrejo. Do, kondutu bone, kaj ni ne traktos vin kiel malamiko... Ĉu mi povas kalkuli pri vi?

— Vicpecoj kaj diversgrada drataro estos necesaj. Taŭgajn laborilojn vi posedas, ĉu ne? Poste nur laŭbezone, sed... ĉu indas?

— Endas! — seka repliko — Jen via tasko, kaj

vi estas bonŝanculo, ĉar ni bezonas vian sperton.

— Sed kio okazos, post kiam vi ne plu bezonos min?

La alia okulmezuras la kaptiton de supre malsupren, kaj fiere respondas:

— Kvankam malamikoj pro malfeliĉaj cirkonstancoj, tio ne signifas maldankemon miaflanke. De nun vi laboros ĉe ni. Mia familio konsistas el tri homoj, nome mia edzino Mariana, mia filino Greta kaj mi mem Oktavio. Krom butikisto mi estas vilaĝestro! Do, eklaboru!

Kune kun tiom da radiaparatoj, Pako tie restas plurajn horojn. Ne tro malfacile li riparas la unuan, agordas ĝin, kaj tuj eksonas muziko.

— Spertulo pri tio vi ja estas, sendube... — ina voĉo aŭdigas sin de malantaŭe. — Jen via tagmanĝo, espereble pli bona ol tia de la koncentrejo. Mi estas Mariana, la edzino de la vilaĝestro! Bonan apetiton!

Li stariĝas iom embarasita, dankas, kaj bonedukite volas sin prezenti:

— Mi estas...

— Pako... mi jam scias... — kaj ŝi foriras sen plia vorto.

Je la difinita horo du soldatoj atendas fronte al la pordo kaj lin rekondukas al la koncentrejo. Tiel ripete okazas ĉiutage dum semajnoj, ĝis...

— Ekde hodiaŭ ni fidus vin por iri kaj reveni tutsola. La uniformon de kaptito vi daŭre uzos, kaj ne aŭdacu fuĝi, ĉar vi ne eskapos! — lin avertas la koncentreja sub-oficiro.

Ne ĉiuj difektitaj riceviloj estas tiel facile ripareblaj, kiel la unua; plie, longedaŭra estas ekhavigo de vicpecoj kaj aliaj riparo-materialoj. Tiam nenion alian li povas fari krom atendi... atendadi... Do li havas sufiĉe liberan tempon por aŭskulti radielsendojn el ambaŭ flankoj de la multmortiga konflikto, kaj resti bone ĝisdatigata pri ĝiaj sangaj evoluoj.

"Ĉi tie milit-novaĵoj el Libermondo. Plia venko en la nordokcidenta fronto. Niaj trupoj, ne suferinte iun ajn viktimon, sukcesis elpeli plurajn malamikajn batalionojn, kaŭzante al ili nekalkuleblajn perdojn."

"La armeoj de Arjanujo avancas ĉiufanken kaj disvenkas nenombreblajn malamikajn soldatojn. Niaj aviadiloj sukcese bombardis kaj detruis industriajn instalaĵojn en la tiel nomata Libermonda teritorio."

Ian tempestan nokton, pro danĝeraj inundoj sur la ĉirkaŭaj vojoj, la vilaĝestro sciigas:

— Mi ĵus ricevis telefonan permeson de la koncentreja superulo, por ke ĉi-nokte vi restu ĉe ni, kaj je mia respondeco tiel okazos ekde hodiaŭ. Do, helpu min instali en tiu deponejo soldatliton, kiun mi posedas, por ke vi dormu tie de nun.

— Mi sincere treege dankas al vi! — elkore konfesas Pako.



Antikva radiaparato de la tempo de la Dua Monda Milito

— Mi esperas, ke ĉi tiu milito finiĝu, kaj ke ni ne plu estu malamikoj. Sed ne provu fuĝi, ĉar vi fiaskos.

Ekstere la naturo, ribelinta kontraŭ la homoj en malpaco, ilin punskoldas per timegigaj tondroj, pluvtorento, kaj tial jen la enmarĉigo de kampoj kaj vojoj. Pako enlitiĝas kun feliĉa sinteno pro la komforto al li donita de tiu tempesto. Tamen enĉambra brueto lin atentigas por io stranga... Sed... milda mano lin malpermesas prilumi ĝin.

— Kion!!!... — li ekkrias.

— Ĉit!!!

— Greta!!!... Kion vi volas, fraŭlino?!

— Amori kun vi.

— Ĉu?!... Sed...

— Mi jam estas satega de tiom da milito, kiu ne plu finiĝas. Mia enamiĝinto pri ĝi entuziasme ne ĉesis paroladi, ĝis kuglo aŭdacis mutigi lin. Mi volas profiti de mia juneco antaŭ ol la samo ankaŭ min trafos.

— Sed...

— Mi ĝustatempe funebris lin. Ni ĝuu la vivon dum ni ĝin posedas... Ne poste! Malvarmiĝas ekstere, nun ni varmiĝu kune... Kaptu la okazon, ĉar oni ne scias, ĉu ĝi ripetiĝos!

— Sed...

— Ĉit!!! — kaj ŝi fermas lian buŝon per siaj forte premantaj lipoj...

Ne plia "sed" estiĝas.

Tagon post tago la milito longiĝas, tamen ankoraŭ en foraj lokoj. Ĝia disvolviĝo estas informata, en ĉi tiu vilaĝo, nur pere de la amaskomunikiloj, kiuj estas la maloftiĝantaj ĵurnaloj kaj precipe radielsendoj:

"Ĉi-tie Arjanujo! Lastaj informoj pri la triumfoj de niaj armeoj: En ĉiuj frontoj niaj kuraĝbravaj soldatoj avancas ĉiam senhezite!"

"Niaj transmaraj aliancanoj plifortigas la kontingentojn de siaj trupoj cele al kiel eble plej rapida milita venko de Libermondo!"

Poiome la kunvivado de Pako ĉe liaj

gastigantoj fariĝas rutina, preskaŭ hejmema: flanke de la riparo de difektitaj aparatoj, estiĝas ĝeneralaj konversacioj pri mastrumaj aferoj, kaj ĉiutagaĵoj, eĉ tutkuna aŭskultado de radielsendoj pri la nenombreblaj bataloj. Por malpezigi sinjorinon Marianan el penigaj laboroj, li serveme kunportas nutroprovizojn de najbaraj spicejoj. Krome, tio ebligas al li rutinliberajn promenadojn en la ĉikaŭaĵoj.

Nur li plu manĝas sola, ĉar sidigi malamikon ĉe sian tablon, dommastro kia la vilaĝestro ne povas. La kaptito same daŭre kuŝas en la buda var-tenejo kune kun la aparataro, kaj... kelkfoje ankaŭ kun Greta. Simpla rutina travivado.

Ankaŭ primilitaj novaĵoj fariĝas rutinaj: konkero de malamikaj ĉefredutoj... rezistoj... kaj forpuŝoj de trupaj atakoj plenigas la buŝojn de la anoncistoj; asertoj, kontraŭdiroj, traeteraj vortobataloj pri surteraj mortigaj interfrapiĝoj.

Iumatene ekfulmo tondre eĥas tra la amaskomunikiloj:

"Libermondaj trupoj ĵus invadis teritoriojn sub regado de Despotlando!"

"La heroaj soldatoj de Arjanujo kuraĝe forpelas la invadantojn!"

De ĉi-frazoj fragile pendas la vilaĝanaj espero, kiel strasoj de inaj orellomboj.

Laŭmezure la informoj pri la milito iĝas pli kontraŭfavoraj, kaj kreskantaj zorgoj plie enŝoviĝas en ĉiujn animojn. Iom post iom la fiermienoj de la arjanoj malvigliĝas, iliaj rektigitaj dorsoj ekkurbiĝas, voĉoj iĝas malpli laŭtaj, kvazaŭ timantaj esti aŭdataj de la malamikoj. Je solidara kompreniĝo, eĉ la hundoj preskaŭ ne bojas, kaj iliaj vostoĵoj kaŝiĝas inter siaj malantaŭaj kruroj. Kolektiva moralo svenas iom post iom, kaj ŝanĝiĝas al resignacia nehaltigebla fatalaĵo. Ĉio perdita...

— Kiom mi ŝuldas? — kun monbiletoj enmane, demandas Pako al la spicisto.

— Ĉu por la vilaĝestra familio?... Ĉi-foje nenion... Ne plu valoras la peno... Ankaŭ por vi... Senpage prenu ion ajn viaŭ... Ne plu valoras la peno!

Survoje ŝajnas al li, ke ĉio silentas, eĉ ne plu aŭdeblas la flirtsusurojn de la arbofolioj milde lulataj de venteto.

Nenia surprizo estiĝas ĉe la mienoj de la domaj mastroj, antaŭ tia komplezo de la spicisto. Oktavio simple diras:

— Ĉiam simpatia li estis... Ekde infanaĝo, kaj malgraŭ ĉiaj okazaĵoj en lastaj jaroj, ni ĉiam elkore restis amikoj... Li ja pravus... Ne plu valoras la peno...

Ŝvebas en ĉies animoj ia humila akceptemo de fatala neevitebleco. Ne plu protestoj aŭ riproĉoj, neniel oni kverelas. Ne plu valoras la peno. La frazo estas senĉece ripetita... ĝis elĉerpiĝo: Ne plu valoras la peno!... Oni submetiĝas nekondiĉe...

— Mi... Kelkaj aparatoj estas ankoraŭ

riparendaj... Mi prenas de vi forpermeson... mi...

— Ne foriru tuj; ne urĝas... ne plu valoras la peno... Sidiĝu ĉi-kune... Tio ne eblis antaŭe...

— Sed...

— Ho... ne surpriziĝu! Fakte ne plu valoras la peno...

— Kial? Tion mi estis ripete aŭdanta de ĉiuj flankoj ...

Oktavio rigardas al Pako, kaj klarigas:

— Sidiĝu ĉi tien apud ni sursofe. Ekde nun ni jam ne estas malamikoj. Arjanujo baldaŭ ĉesos ekzisti, do ne plu regas la despotoj, kiuj kreis tian teniĝon. Ni jam komprenis, ke la rezistoj de niaj armeoj, forpelado de malamikaj trupoj, ktp., ktp., okazas nur en la amaskomunikiloj, ne surloke. Ĉion oni jam perdis...

Li obeas, kaj hezitas en atendo de io svaga, nedifinebla. Sinjorino Mariana rompas lian nedecidemon:

— Sur via lito kuŝas ordinare civila kostumo, kiun vi devos surmeti por anstataŭigi tiun uniformon de kaptito. Mi esperas, ke ĝi komforte alĝustiĝos al vi.

Ŝia edzo aldonas:

— Kaj jen fervoja bileto, kiu permesos al vi libere vojaĝi ien ajn en nia teritorio, prefere ĝis la limo kun Neŭtrolando.

— Pardonu! Kio okazas? Mi ne komprenas.

— Okazas nur... la baldaŭa finiĝo de la milito, la ĉesigo de ĉio, eble de nia vivo. Ne indas ŝajniĝi, ke nenio okazas, ke nenio ŝanĝiĝis. Nur ne plu valoras la peno rezisti. Ĉio estas perdita. Do oni profitu la estantan momenton, sen kvereloj, sen zorgoj... pace... Neniu ja scias, kio venos tuj poste... Do hastu survoje al via patrio, renkonte al viaj familianoj, kaj bonŝancon por postvivantoj... ĉiufanke... Sincere...

— Nek vi, nek mi, okazigis tiun travivitan hororon. Ni la popolanoj mem ne estas malamikoj. Dum militoj ni ĉiam ludas rolon de statistoj, laŭokaze faligeblaj kvazaŭ ĉevaloj en filmoj de uestvakeraj rajdadoj. Tio estas fakte pruvita ĉi-momente en ĉi-tiu paradizero perdita meze de la monda infero...

— Lasu vian adreson, kunportu la nian. Eble kaj espereble ni denove renkontiĝos en tute plej feliĉaj cirkonstancoj.

Sekvantan matenon, post noktamura adiaŭo kun Greta, Pako iom nostalgie deiras de la gastiganta domo kaj vilaĝeto.

* * *

Ĉiuj aŭdantoj mienas ravitaj... nekredemaj. Pako finiĝas:

— Jen la vera vero. Vi rajtas ne kredi. Nun al la ĉampano, ĉar tiun mi jam de longe ne gustumas.

— Saluton al Paco!!!

★

POLPO EN OLIVOLEO

LAŬ FAMILIO SANTOS

João José Santos

“Ne manĝu tro, ne trinku tro,
se vi volas manĝi kaj trinki longe.”



Polpo ankoraŭ kruda.

INGREDIENCOJ

- 1 polpo ĉirkaŭ 1,5kg-a
- 1 granda ajlo
- 3 litrodekonoj da olivoleo

ANTAŬPREPARO

Lavu la polpon tre bone per akvo kaj vinagro, frotante ĝin intermane.

Demetu ĝiajn okulojn kaj la akson. Fortranĉu la pintojn el la brakoj. Faru



Ne demetu la ŝelojn el la ajleroj.

kelkajn tranĉetojn sur la supera parto por faciligi la kuiradon.

KUIRADO

Atenton! Ne aldonu akvon nek salon!

Metu la polpon en poton. Elŝeligu nur la eksteran parton de la ajlo, kaj pistu ĉiujn ajlerojn. Dismetu la pistitan ajlon en la poton. Verŝu la tutan olivoleon sur la polpon kaj la ajlon.

Alĝustigu la kovrilon sur la poton, kaj lasu ĝin en malforta fajro dum 30 minutoj.

Demetu la potokovrilon, turnu la polpon aliflanken, kaj lasu ĝin sur malforta fajro dum plus 20 minutoj.

Tiam, piku ĝin per forko por ekscii, ĉu ĝi jam estas sufiĉe mola. Se ĝi ankoraŭ ne estas supla, lasu ĝin plus 10 minutoj.

Atenton! Kiam ĝi estos supla, demetu ĝin el la poto. Ĝi ne perdu la haŭton. Se vi lasos ĝin pli da tempo sur la fajro, ĝi reduziĝos.

KUN ĜI

Servu ĝin kun boligitaj terpomoj kaj salato. La kuneco de altkvalita ruĝa vino reliefigos la guston de ĉi tiu plato.



Olivoleo.